



Estrara Komunikado EKO 2017-02 sendita el Budapeŝto, la 31an de januaro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkröĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

UEA invitas prelegi en la IKU-sesio en Seulo

Kadre de la 102-a UK en Seulo okazos la jubilea 70-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas profesorojn, docentojn kaj personojn kun similaj kvalifikoj sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU rete (amri@huji.ac.il) aŭ paperpoŝte: prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-7179901 Modiin, Israelo.

La proponoj alvenu plej laste la **1-an de marto 2017**.

Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu prelego kadre de la IKU kaj el du kromaj prelegoj. Tiukaze bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝon. Proponoj kiuj ne estos elektitaj por IKU, povos tamen esti utiligitaj en aliaj kadroj, kiel Scienca Kafejo.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia [aliĝo](#). Akceptita IKU-prelego estos kompensita per honorario de 260 EUR kies duono dependas de la ĝustatempa livero de la teksto por la IKU-libro. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la [retejo](#) de IKU.

Stipendikonkurso de ILEI, Busano 2017

La Estraro de ILEI anoncas konkurson pri stipendioj por 22 aliĝintoj de la 50-a Kongreso de ILEI en Busano, Korea Respubliko, 15–22 julio 2017, el kiuj:

- 4 infanoj po €110 por partopreno en la Infana Universitato (v. la februaran revuon *Esperanto*),
- 10 junuloj po €130 por partopreno en instruista trejnado aŭ progresiga Esperanto-kurso kaj
- 8 plenkreskuloj po €140 por partopreno en instruista trejnado.



La stipendioj kovros la aliĝkoston kaj malpliigo je po €100 por loĝkostoj en la junulargastejo Arpina (la kongresejo). Gajnintoj de la stipendio mem pagos siajn vojaĝkostojn, vizkostojn kaj ceteron de la restadkostoj super € 100. **Limdato por petoj:** 2017-04-30

Rigardu la retejon <ilei.info> por pli da kondiĉoj kaj indikoj, kiel konkursi, aŭ skribu al: radojica.petrovic.rs<ĉe>gmail.com kaj <ilei.sekretario<ĉe>gmail.com,

12a Movada Foiro dum la UK en Seulo

La Movada Foiro estas grava okazo dum la Universala Kongreso, kiam ĉiuj Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj aliaj movadaj instancoj povas prezenti sian agadon al la kongresanaro. Ĉiu asocio ricevos senpage spacan ĉe tablo, kie ĝi rajtos prezenti kaj vendi siajn afiŝojn, informfoliojn, eldonaĵojn, fotojn de sia agado kaj simile. Disiris mendilo kun la resenda limdato: la 31-a de majo 2017. La dato de la Foiro: sabatvespere, la 22a de julio 2017. Ĝi okazos ekstere, se la vetero permesas, por ke la publiko povu ĝin vidi. Alikaze, interne.

La 44a internacia Esperanto-sumoo

Bonorde finiĝis la januara sumoo, kun 366 partoprenantoj (la ĝisnuna rekordo estis 318). La unuan fojon Koreio okupis la unuan lokon kun la partopreno de 93 homoj. Dum tiuj du semajnoj oni legis entute 20 000 paĝojn, nome 100 librojn kun 200 paĝoj.



Ĉina Donaco en la Printempa Festo

Hodiaŭ estas la unua tago de la Ĉina Novjaro 2017. La Printempa Festo daŭras tradicie 15 tagojn ekde hodiaŭ. En tiu festo mi sendas al vi ĉinan donacon: la ununa numeron de la nova revuo **Tra la mondo** (vidu la februaran revuon *Esperanto*) estas senpage elŝultebla ĉe [http://www.elperno.cn/elibro/Tra-la-mondo\(reta\).pdf](http://www.elperno.cn/elibro/Tra-la-mondo(reta).pdf) Vi rajtas dissendi la revuon en viaj landoj laŭ via plaĉo. Viaj artikoloj

por la revuo estas bonvenaj. Mi kore deziras al vi ĉiuj Feliĉan Novjaron!

Trezo Huang Yinbao, ĉefredaktoro de *Tra la mondo*

Vortoj: 562

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldona al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedistoj.